

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

DU PILOLOJ

En humoraĵa rakonto la nomoj de la rolantoj ne estas gravaj; la ĉefa afero estas la okazaĵoj. Tial, estus senutile citi la nomojn de la herooj de tiu ĉi « dramo »; sufiĉu ilin prezenti nur jenmaniere:

Edzo, laŭrilate bofilo, senokupa stratservisto, drinkema kaj drinkama, oftebria.

Edzino, multokupa lavistino, plorema sed ne plorama, oftmalespera.

Bopatrino, neokupa eks-kuiristino, nek plorema, nek plorama, nek drinkema, nek drinkama, sed precipe ne drinkemulama.

Farmaciisto konsolema, konsilema, celtrafema kaj donacema. Tre versaĵne « kontraŭbopatrinpartiano ».

... Ni do komencu la komedion ...

Estas la tria horo post noktomezo. Edzino kaj bopatrino dormas. Edzo forestas ... sed ne! li ĵus rehejmiĝas. Post grandaj penadoj li sukcesis alveni ĝis la enirpordo, sed li ne povas eniri la fermitan ĉambron, ĉar li ne trovas la ŝlosiltruon (cetere, li ĝin klopodas malŝlosi per sia pipo). Li murmuris. Li murmuris, insultante la konstruiston de la domo, pro lia maltaŭga laboro. Aŭdinte tion ĉi, la plorema edzino ekploras, kaj la bopatrino malfermas la pordon. La edzo eniras, ŝanceliĝas, ŝancelas la meblojn, esprimas sian malkontentecon pro ilia trolargeco, ĉar ili restigas tro malmulte da disponebla irejo. Li balbutas neniam ankoraŭ aŭditajn vortojn, kiujn la du virinoj ne povas kompreni, tiom malpli, ĉar ili ne havas ekzempleron de iu « Plena Vortaro Esperanta-Franca ». — Konsuminte siajn balbutfortojn, li kuŝiĝas — hazarde sub la liton.

— Tio ne estas plu tolerebla, — plorĝemas la malfe-
liĉa edzino.

— Tio ne estas plu tolerebla, — tondras la servopreta
bopatrino. — Mi tuj helpos, vi vidos, mia kara filino.

La bona bopatrino rapide sin vestas kaj eliras. Ŝi iras,
iras, iras... ĝis la farmaciejo. En tiu ĉi horo, kompren-
ebla, la farmaciejo estas «jam» kaj «ankoraŭ» fermita.
La brava bopatrino sonorigas. Neniu respondo. Duafoje
ŝi sonorigas. Neniu respondo. Post la triafoja sonorigo,
aperas oscedanta viro, negliĝe vestita, viro konsolema,
konsilema, celtrafema, donacema. Facile estas diveni, ke
li estas la farmaciisto.

— Kion vi deziras tiel urĝe? — li demandas kun tono,
el kiu elradias malkontenteco.

— Donu al mi efikan kontraŭdrinkemilon aŭ remal-
ebriigilon.

— Por kiu? por kio?

— Por mia bofilo, kiu estas ĉiutage ebria, kaj per tio
li difektas la familian feliĉon, pacon, amon. Nek petoj,
nek petegoj, nek minacoj utilas...

— Bone, — interrompis la farmaciisto la priskribon
de la vortriĉe klariganta bopatrino. — Mi donos al vi du
pilolojn; ili certe efikos.

Kaj la «celtrafema» farmaciisto subite donis du ŝat-
indajn vangofrapojn al la mirigita bopatrino, poste, ŝin
trudpuŝinte sur la straton, refermis la butikon.

La bopatrino rapidis hejmen kun la donacricevitaj
«piloloj», kuŝiĝis en sian liton kaj dormis ĝis mateno.

Matene, la bopatrino, laŭkutime, komencas riproĉi la
per bonfara ronkdormado resobriĝintan bofilon. Li, ankaŭ
laŭkutime, indiferece aŭskultas la insultojn.

— Pripensu, — diras ŝi, — ke per via konduto vi ak-
celas la entombiĝon de via kompatinta edzino.

— Jes...

— Kaj mian entombiĝon...

— Jes, jes...

— Kaj vian propran entombiĝon...

— Jes, jes, jes, dank'al tiuj allogaj bonamikoj.

— Oni devas ĉesigi tiun vivmanieron.

— Jes, jes...

— Mi alportis por vi du pilolojn, kiuj vin certe deku-

timigos de tiu terura drinkado. Jen, mi tuj donas al vi unu pilolon.

Vangofrapo : pilolo N° 1.

— Mi esperas, — tondras la bopatrino kun fulmantaj okuloj, — ke tiaspeca pilolo potence efikos. Mi havas ankorau unu ; mi ĝin konservos por morgaŭ, se bezone . . .

La timigita bofilo restis sopra la alian tagon. La edzino estas gaja, feliĉa. La brava bopatrino vigle kaj bonhumore eliras al la foiro, por aĉeti la ĉiutagajn nutraĵojn. Tie ŝi renkontis la farmaciiston.

— Nu, sinjorino, — demandis li kun ruza rideto, — ĉu la piloloj estis bonaj ? ĉu ili utilis ?

— Jes, sinjoro, dankon, viaj piloloj estas vere bonegaj kaj utilaj. Ili absolute kuracas. Sufiĉis nur unu por mia bofilo, la alian mi ne bezonas, mi do ĝin jen redonas al vi.

Vangofrapo : pilolo N° 2 . . .

PAUL DE LENGYEL.

AHASVERO

Legendo de V. DOROŠVIČ

Ĉiujn ĉi tagojn li sentis sin iel ne bone.

Io premis lin, premegis, kvazaŭ ŝtono kuŝis sur la animo.

Eĉ en la sankta vespero de Pasko li ne eksentis tiun ĝojon, kiun li sentis ĉiam.

Li, Ahasvero, vera hebreo, vera servisto de la Sinjoro, kies piecon oni metis je ekzemplo !

Eĉ en tiu ĉi vespero li ne eksentis trankvilan ravon, kiu ĉiam plenigis lian animon.

Lin ĉirkaŭis la gefiloj, liaj edzinoj, karaj nepoj, tuta lia familio, kiun li tiel amis kaj per kiu benis lin la Sinjoro.

Sed liaj pensoj estis malproksime, kaj la rigardon ne ĝojigis bildo de feliĉo, kontenteco, abundo.

Eĉ tiam, kiam li, la plej aĝa en la gento, benante macojn, sin turnis kun preĝo al Jehovah, Sinjoro de l'potencoj, elkondukinta sian amatan popolon el Egiptujo, — eĉ tiam al li ŝajnis, ke el malproksima, malluma angulo de la ĉambro lin rigardas tiuj okuloj.

Ili rigardas kun mildeco, sufero.

Li sentis en si tiun rigardon.

Tiel rigardas ŝafido en tiu momento, kiam forta buĉisto, forte tenante ĝin per unu mano, per la alia enpuŝas tranĉilon en ĝian gorĝon.

Milde kaj sen komprenpovo.

Kvazaŭ ĝi volas diri :

— Pro kio ?

Kvazaŭ li, Ahasvero, faris mortigon !

Kion do li faris tian, efektive ?

Preter lia domo oni kondukis al ekzekuto krimulon, arogantan uzurpulon, kiu kuragiis ŝajni sin, — terure estas pensi, — Filo Dia.

La malbenitan kaj kondamniton de ĉefpastroj, sinadriono, de tuta popolo.

Li iris, malhonorigita, turmentita, Mem portante ilon de males-tima, hontiga ekzekuto, abomena, elpensita kaj alportita Judujon de Romanoj.

Kaj apud la domo de Ahasvero Li malfortigis sub la pezo kaj sin klinis sur la sojlon de la domo, por uzi nur minuton da ripozo.

Kaj Ahasvero puŝis Lin per la piedo.

Li forpuŝis Tiun, Kiun forpuŝis jam ĉiuj : la eklezio, la tuta popolo.

Kaj nur.

Li puŝis.

Sed iam ankaŭ li, maljuna Ahasvero, la granda patrioto, revanta pri restarigo de Juda regno en tute ĝia brilo, grandeco kaj gloro, — iam ankaŭ li estis varmega adepto de tiu Enigma Homo.

Kunveninte kun la plej ĉefaj kaj honoraj homoj en la loko, kie ilin ne povis subaŭskulti romaj spionoj, korprenate li demandis la homojn, kiuj alvenis el malproksimaj urboj de Palestino :

— Kio Tio ?

Kaj ili rakontis al li pri novaj signoj kaj mirindaĵoj, aperigitaj de la Profeto, pri amasoj da popolo, kiuj senforire paŝas post Li, obeemaj al ĉiu Lia vorto, pri tio, ke ĉie meze de la popolo flustre jam elparoliĝas la vorto « Reĝo ». Sola, kio lin mirigis komence, — tio estis neelektemo de l' Reĝo.

Kiel povas kuŝi Li tute egale ĉe tablo kaj kun plej honoraj, ĉefaj homoj de fama pieco kaj bonfaranta vivo, kaj kun plej malestimaj pekuloj, — homoj de malnoblaj inklinoj, deaĉetistoj de romaj impostoj, forŝirantaj la lastan haŭton (1) de la parenca popolo pro la malamiko?

Sed ĉu jam sola aparteno al la popolo amata de Dio ne prezentas tian indecon, kia superas ĉiujn aliajn malindecojn ?

Ĉu ne ĉiuj estas posteuloj de Jakobo ? Ne ĉiuj estas infanoj de Dio, infanoj de la popolo ? Ĉu ne al tuta popolo, amata de Dio, estos donita potenco super la mondo ?

Ĉu ĝustatempe estas nun dividi la popolon je bonkoraj kaj malbonkoraj, je bonaj kaj malbonaj ?

Devas kuniĝi inter si ĉiuj, la tuta popolo, por dejeti de la parenca lando la jugon de Romanoj.

Tio estas antaŭ ĉio, la plej ĉefa kaj grava afero.

Sed kalkulado kaj dividado estos poste.

Estas grave, ke ĉiuj aliĝu al la granda movado, ke ne havu la Romanoj amikojn meze de la popolo.

Kaj la maljuna Ahasvero sin klinis antaŭ la saĝeco de la Profeto, kiu unuigas la popolon, egale allogante al si la korojn de bonaj kaj de malbonaj.

— Tia saĝeco estas nur el Dio !

Sed nekomprenebla estas sola afero.

Por kio do la Profeto elverŝas siajn favorojn ankoraŭ sur idolojn ?

Ĉu ne al sole amata popolo estas promesita la tero ? ĉu idoloj trovas por si lokon en tiu regno universala, kie regos, reĝos kaj potencos nur posteuloj de Jakobo ?

Sed ankaŭ ĉi-tiu dubo ne longe turmentis la grandan patrioton.

Ho, la maljuna Ahasvero ne vane apartenis al la popolo, al kiu okazis harmonia vivado — kaj kun Tiro, kaj kun Sidono, kaj kun Romo, kaj kun Kartago, kaj kun Grekujo, kaj kun Finikujo.

En liaj vejnoj ne vane fluis sango de liaj prapatroj entreprenemaj kaj saĝaj, komercistoj kaj politikistoj scipovantaj konsenti tiel kun fremduloj, kiel kun alireligianoj, scipovantaj dormigi ilian maldormecon kaj akiri ilian amikecon.

Ho, kiel komprenis li sian Profeton !

Romanoj, — jen kiun oni devas venki, rompi, elpeli.

Romanoj, — jen estas ĉefa malamiko, kaj ilin oni devas senigi

(1) Figura esprimo, kiu signifas : forpreni la lastan havaĵon.

liganojn, alloginte aliajn idolanojn al sia flanko per boneco kaj kompatemo. Kaj aliaj mem falos al la tero antaŭ la potenco kaj grandeco de la granda popolo rompinta eĉ la nevenkeblajn Romanojn.

Ĉu la juĝistoj agis nur per forto kaj neniam uzis ruzon? Ĉu por prepari triumfon de la parenca popolo, ili uzis nur forton de la muskoloj, kaj neniam la plej grandan homan havaĵon: saĝon?

Kaj Ahasvero volis vidi sian Profeton potenca kiel Samsono, saĝa kiel Jeffajo.

Famo pri tio, ke Li venas Jerusalemon al la festo de Pasko, eksancelis la tutan popolon.

Jes, tiel guste tio devas okazi.

La Sinjoro aperigos al la amata popolo sian favoron en tiu sama tago, kiam Li aperigos ĝin per Moseo.

Kaj la tago de la granda Pasko estos duoble granda tago de la liberiĝo de jugo de Egiptoj kaj Romanoj..

Kaj Lin oni renkontis tiel marŝantan Reĝon.

En la domoj estis kaŝitaj bataliloj, — kaj sur la stratoj Lin atendis grandegaj amasoj da popolo. Sur lia vojo oni sternis la plej bonajn vestaĵojn. Al Li oni ŝvingis verdajn, ĵus ekkreskantajn branĉojn, kiel simbolojn de renaskiĝo.

Ĉiuj, eĉ infanoj, laŭte, aŭdigante ĉiujn, antaŭ la okuloj de ĉiuj, nomis Lin Reĝo.

Kaj oni atendis nur Lian vorton, por ĵeti sin kontraŭ la Romanojn kaj levi standardon de liberiĝo.

Kaj kio do?

Ĉe tiuj ĉi krioj, ĉe aspekto de tiu ĉi amaso preta por ĉio laŭ Lia ordono, — ĉu ekbruligis en Liaj okuloj sankta fajro de inspiro?

Ĉu forŝirigis de Liaj lipoj tiu vorto, kiun atendis de Li, turmentata sub la jugo de Romanoj, sed denove ekstariginta, kiel leono, — tiu ĉi mizera popolo?

Ne, ne, ne!

Malespero komencis enŝteliĝi en la animon de Ahasvero.

Sed nur enŝteliĝi, — li eĉ tiam ĉiam ankoraŭ malesperi.

Li avide observis ĉiun paŝon de la Profeto.

Kaj kiam Li ekkonis, ke Lin post sekreta interkonsiliĝo kun la plej proksimaj disciploj oni kaptis en la Oliva ĝardeno kaj forkondukis al la ĉefpastro, — Ahasvero tutan nokton marŝadis post Li, li atendis, ne rimarkante la noktan malvarmon.

Li atendis, ke tie, meze de l'ĉefpastroj kaj estroj, la Profeto aperigos signon, kiun oni atendis de li, — kaj tuj malfermigis pordoj, kaj Li aperos meze de estroj kaj sinadrianoj, ĉirkaŭita de pastroj, en la tuta brilo de gloro kaj sia grandeco, kaj deklaras ribelon.

Sed li pacience toleris insultojn, kaj eĉ mokojn.

La Profeton oni mokis!

Kaj nur antaŭ mateno foriris Ahasvero kun rompita animo, kun rompitaj esperoj, kun rompita kredo je la Profeto.

La trompo estis evidenta. La maljuna Ahasvero eraris. Tio ne estis Profeto.

Kaj tiam, kiam Li turmentita, malglorigita, malfortiĝante sub la pezo de malhonora ilo de ekzekuto, falis apud la sojlo de lia domo, — malamo, malestimo, kolero pro la trompita popolo, honto pro sia griza trompita kapo kaptis Ahasveron.

Ĉiuj vidis lian malhonoran, ridindan eraron.

Parolis ja aliaj, ke Tiu estas trompisto, — kaj li, la maljuna Ahasvero, li kredis Lin!

Li per tuta sia animo deziregis vidi la Profeton, kaj li ekvidis sklavon, kiun oni kondukas al malhonora ekzekuto.

Por tridek argentoneroj oni aĉetis Lin, la Profeton, kaj kiel kun sklavoj, oni faras ĉion, kion oni volas.

Larmoj de ofendo, honto, kunpremisa la gorĝon de la maljuna Ahasvero, kaj li levis sian piedon por forpuŝi la mizeran, senfortan sklavon.

Tiu ekrigardis . . .

Kial do tiu ekrigardo ankaŭ nun estas fiksita sur lin el malluma angulo de la ĉambro ?

Nun, je tiu ĉi horo, kiam li volus per la tuta animo, per la tutaj pensoj sindoni al preĝo al Jehovah, Sinjoro de potenco, al kiu li servis dum tuta sia vivo ?

Kial nek dum lumo de tago, nek dum krepuskóĵ de nokto ekzistas momento, kiam de ie ne estus fiksita sur lin tiu ĉi ekrigardo impresa, kvazaŭ enbruligita en lia animo ?

Kial li sentas sin mortigisto, — plu . . .

Kaj ja ne Dio do, sed sklavo malhonore estas krucumita tie, sur Golgota.

Ĉu Dio mortas ?

Sed Li mortis, — kaj kiel mortis !

Ĉu Li povis esti kondukanto alvokita por iri kiel ĉefo de furiozigitaj leonoj ?

Kaj Ahasvero vane alvokis ĉiujn fortojn de sia penŝado, alvenigis ĉiujn argumentojn de la prudento.

Ahasvero, posteulo de la popolo, kiu dum tuta sia vivo kiel leono batalis pro sia sendependeco, posteulo de herooj batalintaj pro la sendependeco kontraŭ ĉiuj malamikoj, ĉirkaŭantaj ĝin de ĉiuj flankoj.

Posteulo de la popolo, al kiu malamikoj detruadis ĝis fundo ĝiajn urbojn, kaj kiu denove sur ruinoj konstruadis fortikaĵojn kaj templojn.

Lin, posteulon de tiu militema popolo, ofendis tiu morte silenta, milda, rapida, tiu malcerteco.

Li ne povis esti kondukanto.

Li erarigis la sen tio jam turmentitan, mizeran popolon.

Li estas meritinta tion, kion Li ricevis.

Kial do tiel malfacile estas por la maljuna Ahasvero ?

Kial kvazaŭ li faris mortigon ?

Kial ?

Kion li faris ?

Vane Ahasvero sin turnis por instruo, helpo, konsilo, klarigo al la maljuna rabeno, instruita, honorinda sinadriano, al la granda instruanto de la popolo.

— Trankviligu, ĝi estas simpla kompatato. Sento, kiu devigas nin rilati kun kompatemo eĉ al krimulo. Bela malforteco de animo (tiel parolis la maljuna rabeno), sed ne cedu al tiu malforteco. Ĉu ne laŭ bildo kaj similo de Dio estas kreita la homo ? ĉu ne celi por similigi al diaĵo estas granda difino de homo ? ĉu ne estas tiel ? Jehovah, Dio de kolero, la Sinjoro de venĝo, — ĉu Li konas kompaton al krimulo ? ĉu Li ne venĝas ĝis tria generacio ? ĉu Li ne alkondukas krimulon al ekzekuto ? ĉu li ne malfermis la teron sub ribelantoj, kiuj ne plenumis Lian volon ? ĉu Li ne frapis per pesto en momento de la kolerego eĉ sian amatan popolon ? ĉu li haltigis sian punantan manon pli antaŭe, ol anĝelo-ekstermanto mortigis ĉiujn unuenaskitojn de malpiaj Egiptoj ? . . . Ne vi, mia filo, mia malnova amiko, ne vi estas kulpa pri tio, ke vi forpuŝis la malfortiganton for de via sojlo. Li kolierigis Jehovah'n, kaj Dio de l' potenco elektis vin por pligrandigi la mezuron de l' turmentoj. Li, Kies nomon ni timas elparoli, gvidis vian agon, plenigante mezuron de meritita ekzekuto.

Tiel parolis la maljuna rabeno, per serenaj okuloj rigardante Ahasveron, — kaj Ahasvero sentis, ke de ie rigardas lin aliaj okuloj.

Ili rigardas kun sopiro, doloro, sufero.

Kaj tiu rigardo bruligas kaj premeblas lian animon.

Li vagis kvazaŭ dormante, premita, rompita, sentante en si tiun rigardon, nek maldormante tage, nek fermante siajn okulojn nokte.

Kaj subite tiu ĉi sciigo . . .

Kun rapideco de fulmo ĝi disflugis en la urbo.

Oni ĝin komunikadis mallaŭte, flustre.

Oni aŭskultadis kun malkonfido, miksitaj tamen kun timo :

— Lia korpo malaperis.

— Oni diras, ke Li revivigis.

Kaj la popolo, perdinte la kredon je la Profeto, parolis :

— La disĉiploj aĉetis Lian korpon de la gardistaro por mono. Kion oni ne povas aĉeti por mono de malestimindaj Romanoj ? Kaj nun oni diras, kvazaŭ Li estas reviviginta ! — ĉu mortintoj reviviĝas ?

Kaj kiam Ahasvero estis aŭdinta ĉi tiun sciigon, kvazaŭ io rompiĝis en lia animo : li ekremis pro la teruro kaj ekĝemis :

— Li Li povis tion fari ! . . .

Kaj time li ekrapidis kaŝi sin sub la tegmenton de sia domo.

Nun li komprenis ĉion.

Jen kial Tiu kun mildeco permesis sin krucumi.

Jen kial Li silente suferis. Kaj per rigardo plena de trankvila kaj klara amo rigardis tiujn, kiuj Lin mortigis !

Li ne timis la morton, ĉar Li estas pli forta, ol ĝi.

Kiu do Li estas, Nekonata, Mistera, silente suferanta, krucumita kaj reviviginta ? Dio ?

Ahasvero kun teruro retirigis de sia familio, la gefiloj, liaj edzinoj kaj la nepoj.

Gefiloj ! Nepoj ! . . . Li estas krimulo, griza maljuna krimulo ; krimulo rilate al ili.

Dio, Dio estis apud la sojlo de lia domo, kaj li forpuŝis Lin !

Li, tiel atendinta Mesion, li forpuŝis Lin, kiam Mesio venis, — kaj kien do ? Al lia domo !

La ĉielo tuŝetis la domon de liaj gefiloj, la domon de liaj nepoj, — kaj li freneza pro furiozeco kaj malboneco, — li levis kontraŭ Dio

Ahasvero forkuris el sia domo, kiel forkuras ŝtelistoj : nokte, silente, de neniu rimarkata.

Li ne povis plu vidi siajn gefilojn, de kies domo li freneze forpelis Dion.

Riproĉo aŭdigis al li en balbutado de la nepoj, kiujn li senigis je beno, sendita al ili de la ĉielo.

Li forkuris el tiu ĉi urbo, kie fariĝis la plej granda, ĝis nun nekonata krimo.

Kie oni turmentis, turmentegis, mortigis Dion Mem !

Li forkuris kaj nenien povis forkuri de tiu rigardo, kiu impresigis en lia animo.

Inter mallumo de nokto lin rigardis ĉiam la samaj okuloj, plenaj je doloro kaj sufero.

Jam la urbo restis malproksime malantaŭe, kaj ĉirkaŭe etendigis senfina ŝtonplena dezerto, — kiam Ahasvero turmentita falis teren.

Kaj tio ne estis dormo, nek maldormo, nek fantomo, nek realeco.

Li staris apud la malsupro de Sinao.

La supro de l' sankta monto fumigis.

De tie tondradis kaj fulmadis.

La tero ŝanceliĝis sub la piedoj de la terurigitaj falinta sur la genuojn amaso, inter kiu staris Ahasvero.

Kaj jen aŭdigis voĉo el la mallumaj nuboj, kovrantaj la supron de la sankta monto.

Kaj estis tiu voĉo tia, ke koroj ekremis pro ĝiaj sonoj, kaj homoj falis teren al vizaĝoj.

— Mi estas Dio via, — kaj ne estu por vi aliaj dioj, krom Mi ! — tiel aŭdigis sur la monto.

« Tio estas Dio ! » — ĝemis en morta teruro la homoj.

Kaj ekvidis sin Ahasvero apud la malsupro de alia monto.

Tuta kovrita de sunlumo, sub sennuba blua ĉielo, kovrita de smeralda verdaĵo, altiĝis Tabor.

Blavis varma venteto, kaj kampaj floroj ekŝanceliĝis sur siaj trunketoj, kvazaŭ salutante iun. De varmo, brilo kaj ĝojo estis plena ĉio.

Kaj de sur la monto, en blankaj, brilantaj kiel neĝo vestoj, kun vizaĝo radianta kiel la suno, malsupreniris lu.

Kaj diris Li :

— Mi estas Dio via, Dio de mildeco, amo kaj pardono. Sufiĉe estas al vi suferi. Mi Mem venis suferi pro vi, por doni al vi eternan feliĉegon.

Kaj estis tiuj vortoj kiel sono de liutoj, kiel trankvila murmureto de venteto, kaj per granda ĝojo, neelparolebla, plenigis ili la turmentitan koron.

Kaj Ahasvero decidis levi la okulojn al la milda Dio de ĉiopardonemo.

Li decidis, ekkriis kaj konsciigis.

Li rekonis Lin, rekonis tiun rigardon....

Tio estis Li.

Terurigita, kun konfuzita spirito, sin jetis teren Ahasvero, timante eĉ penseti pri tio, kion li faris, — kaj komencis peti pri morto.

Li ploregis, kuŝante sur la tero kaj komencis peti pri morto, — pri morto, la sola bono por si.

Kaj nur tie ĉi, petegante pri morto, tiu ĉi mizera, per la spirito alforgita al la tero homo, eĉ Mesion atendinta ne alie ol reĝo kaj tera reganto, nur tie ĉi li komprenis la veran regnon, la regnon de eterna ĝojo, de eterna neestingiganta lumo, la regnon de gloro, feliĉegeco, amo kaj ĉiopardonemo.

Kaj ĝuste tiun regnon li mem forlasis.

Kun teruro kaj malespero Ahasvero ekkuris, penante foriri de si mem, de sia doloro, de tiu rigardo, kiu impresigis en lia animo.

— Iru ! — ordonis al li la voĉo de lia animo.

— Iru ! — flustris ĉio : la ĉielo, la tero, la steloj.

— Iru ! — kriis la vento atakanta la okulojn.

Kaj li iris, kvazaŭ vipinstigata per tiu ĉi krio :

— Iru !

Jarcentoj rapidkuris post jarcentoj, kaj li iris, iris, iris.

Ho, Ahasvero !

Kial vi ne rekonis Dion dum sufero !

Tiu ĉi legendo ekzistas de multaj jarcentoj. Ĝin multfoje oni rakontis al homoj. Oni povas ĝin rakonti malbone kaj bone, sed unu ideo enfalu en vian animon : Neniam forpuŝu tiun, kiu malfortiginta falas apud via sojlo.

El rusa lingvo tradukis MAKSIM BULOĈKIN.

BELA NOKTO . . .

Bela nokto venis . . . en arkaj' ĉiela
Eklumigis stelojn per la mano lerta,
Eklumigis lunon kaj ĝi lumas hela
Super nia stepo vasta kaj dezerta.
Venis am'. En brusto eklumigis koron
Per la sankta sento kaj forflugas kor'
En mirindan landon, mondon en misteran
De suferoj teraj, de malĝojoj for.

Aleksandro Martakov.



LA POMO

Griza, nebula vintrotago. Homoj malbonhumoraj, tremantaj de frostoj. Strata koto aliĝas al la ŝuoplandoj. Aero malseke malvarma. Nenie iom da tiu blanka, ĵus falinta neĝo, kiu ĝojigas okulojn.

Tra strato vagas knabo, bela blondulo, ĉirkaŭe dekdujara, vestita malriĉe, malriĉege. La tuta korpo de la bedaŭrinda knabo tremas kaj liaj okuloj glitas avide rigardante super la fenestroj de bakistejoj. Lia irado estas laca, trenata.

Nun li alvenis ĉe vendejon; li eniras la vestiblon. La halo estas hele lumigita. Vigla vivo regas en la koridoroj kaj antaŭ la stabloj de vendistoj.

La knabo sin trudas en angulon proksiman al la enirejo. Ĉu li serĉas ŝirmon eĉ nur malgrandan, kontraŭ la malvarmo? Neniu atentis lin.

Subite liaj palaj malgrasaj vangoj ekruĝiĝas, la okuloj vaste malfermiĝas kaj fikse rigardas timige pikante korbon da pomoj proksiman al li. La spirado fariĝas rapida, paŭzanta. Sinjoro pasanta hazarde rigardas al li, sed tiam li iras siavoje, plu ne atentante lin. La knabo tamen sentis la rigardon; li kuntiras sin, rigardas timeme post la sinjoron, ŝteliras for el la angulo kaj trudas sin inter la homoj.

Post malmultaj paŝoj denove li haltas, rigardas ree kaŝe al la sinjoro kaj reiras al la antaŭa loko. Li pasas rekte preter la korbo da pomoj.

Dum unu momento la piedoj de l'knabo haltas. La vangoj rericivas sian antaŭan palecon, la vaste malfermitaj okuloj malgrandiĝas, li apenaŭ spiras. Tiam li rapide foriras el la halo kaj paŝas sur la straton.

Ankaŭ tie li ne iras per la kutimaj malrapidaj trenaj paŝoj; rapide li iras antaŭen. De l'ĉefa strato li deflankiĝas, mallarĝa strateto lin akceptas. Ĝia lasta domo estas malnova kaj ruina. Li kuras supren sur la malebena, elpaŝita ŝtuparo, ekmalfermas pordon en la koridoro de la plej supra etaĝo: li estas hejme.

Lito, seĝo, tablo, duone disfalta forno — nenio plu krom nudaj grizeflavaj muroj! Sur la lito sidas virino ĉagrenita, malgrasigita de malsato kaj de zorgoj! — Avara

fajro brulas en la forno. En la ĉambro estas preskaŭ mal-lumo.

« Jen, patrino, unu pomo ! » diras la knabo.

« De kiu vi havas ĝin, Francisko ? » La voĉo de la virino sonas lace kaj raŭke.

« Donace mi ricevis », estas la hezita respondo.

La virino silentas. Ŝi sentas, ke la knabo alportis al ŝi maljuste akiritan havaĵon, — sed ili ja estas tieĥ malriĉaj, malriĉegaj, kiel almozopetuloj ! Se nur la edzo ricevus laboron, tio neniam plu reokazus. Sed hodiaŭ — la malsato doloras ; hodiaŭ ŝi silentos — kaj plue, ĝi ja estas « nur unu pomo » ! . . .

*
* *

Multepeza sufokanta aero plenigas la kunsideojn. La aŭskultejo estas dense plenigita de homoj.

Sur la benko por kulpigitoj sidas beleta junulo, blonda, apenaŭ dudekjara. Nur la okuloj rigardas timeme kaj pikante el sub la densaj brovoj. — La pordo estas malfermata. La ĵurintoj eniras . . . Morta silentego.

« Kulpa je rabmortigo ! » estas la juĝa diro.

En la aŭskultejo falas virino kriegante kaj plorante. La kulpigito enigas la dentojn en la malsupran lipon. Nenia laŭto forglitas el inter la lipoj. Apenaŭ ekstremo flugas super la vizaĝo.

Oni elportas la virinon. Timigaj minutoj de atendo. Fine la diro de l' juĝisto : « Al morto ! »

La kondamnito estas elkondukata. De benko en la koridoro leviĝas virino ĉagrenita, malgrasiĝinta kaj kuras ekplorante renkonte al li. « Mia filo, mia kompatinda, bedaŭrinda infano ! »

Jen, la kondamnito kaptas per kapto harda kiel fero la manon de la virino surgenua antaŭ li kaj senakcente venas de liaj lipoj la vortoj : « Patrino, kio mian kapon kostas, estas la konsekvenco de tia unua ŝtelitaĵo ! »

*
* *

Freŝa, bela mateno. La klara blua ĉielo ridas. Freŝe briletas la roso kaj la suno el la firmamento dissendas siajn radiojn por feliĉigi, por varmigi — por vivigi !

Ĝi brilas ankaŭ en unu el la koridoroj de arestejo kaj spegulas sin subite, dum unu momento, en alte levita hakilo de ekzekutisto. Sed ĝi brilas ankaŭ en subtegmentan ĉambron de malnova ruina domo en strateto de la metro-polo. Lito, tablo, seĝo, forno, — nenio plu estas en la ĉambro.

Sur la lito kuŝas virino ĉagrenita, malgrasiĝinta, ŝiaj grizaj haroj estas senordaj kaj malligitaj. Najbaroj kaj ŝia edzo klopodas reteni la furiozantan, ĝis kiam oni venos por transporti ŝin.

Sed la virino mordas, batas ĉirkaŭ si, bruas, serĉas per konfuzaj rigardoj en la ĉambro kaj kriegas de tempo al tempo : « La pomo ! La pomo ! »

Laŭ germana teksto tradukis

J. SCHRÖDER.



JUNECA KOR'

*Vi, kor' juneca, estas libera,
Kiel la vento en mar' aera ...
Vin ne ekkapto allogkaptiloj
Kaj ne kunforĝos la kateniloj.*

*Ne volas scii, vi, pri servuto,
Vi ŝiras reton de l' punt' kaj koro,
Libera ĉiam via konduto,
Ho, kor' juneca, libera koro !*

*Vi, kor' neniam estos servanto,
Neniel servos al la sinjoro ;
Nur elektita de vi amanto
Estos nur ĉio por vi, ho koro !*

*Vi ne subigos al la perforto,
Dev' estas por vi nur mallibero,
En kiu vivon sen plend' pro sorto,
Ĝis mort' vi trenas en la espero.*

*Al plend' dolora de l'adoranto,
En vi malestas lok' por kompato ;
Ho ve ! vin venkas eĉ falsa kanto
De l'elektita de vi amato.*

*Supernatura, ho, via forto
Kaj per vi sonas anĝela hor', —
Sed kiel ofte vipanta sorto
Vin persekutas, juneca kor' !*

D-ro ANTONO WIECZORKIEWICZ.



FELIETONO

Pentanta pekulo.

Fabelo, de L. TOLSTOJ. (1)

Kaj diris li al Jesuo : « Rememoru, Sinjoro, kiam Vi venos en Regnon Vian ! » Kaj diris al li Jesuo : « Mi vere diras al vi, hodiaŭ vi jam estos kune kun mi en la paradizo ».

(Luk. ĉap. 23, v. 42—43).

Vivis en la mondo homo sepdek jarojn kaj travivis li la tutan vivon pekante. Kaj ekmalsaniĝis ĉi-tiu homo kaj ne pentofaris. Kaj kiam la morto venis, li en la lasta horo ekploris kaj diris : « Ho, Sinjoro, pardonu min, kiel la rabiston sur la kruco... » Apenaŭ li havis tempon eldiri tion, eliris lia animo. Kaj ekamis la animo de la pekulo Dion, kaj ĝi ekkredis je Lia kompatemeco kaj venis al la pordoj de la paradizo. Kaj komencis la pekulo frapi la pordojn de la paradizo kaj peti, ke oni enlasu lin en la regnon ĉielan. Kaj ekaŭdis li voĉon de post la pordoj : « Kiu homo frapas la pordojn paradizajn ? kaj kiel agis ĉi-tiu homo dum sia vivo ? »

Kaj respondis voĉo de akuzanto kaj nomis ĉiujn pekajn agojn de tiu ĉi homo. Kaj ĝi nomis neniujn bonajn agojn.

Kaj respondis la voĉo de post la pordo : « Neeble estas al pekuloj eniri en la regnon ĉielan. Iru for de tie ĉi. »

Kaj diris la homo : « Ho, Sinjoro ! Mi aŭdas Vian voĉon, sed vizaĝon Vian mi ne vidas kaj nomon Vian mi ne konas. »

Kaj respondis la voĉo : « Mi estas Petro-apostolo. »

Kaj diris la pekulo : « Kompatu min, ho Petro-apostolo ! Rememoru la homan malfortecon kaj la kompatemecon de Dio. Ĉu ne Vi estis disciplo de Kristo, ĉu ne Vi aŭdis Lian instruadon el Lia buŝo mem kaj vidis la ekzemplon de Lia vivo ? Sed rememoru — kiam Li sopiris kaj malĝojis anime kaj trifoje petis Li Vin, ke Vi ne dormu, ŝed preĝu, kaj Vi dormis, ĉar okuloj Viaj fariĝis pli pezaj, trifoje Li trovis Vin dormanta. Same kiel mi. — Rememoru ankaŭ, kiel Vi promesis al Li mem ĝis la morto ne rezigni pri Li, kaj kiel Vi trifoje rezignis pri Li, kiam oni kondukis lin al Kajafo. Same kiel mi. — Kaj rememoru ankaŭ,

(1) Tiu ĉi belega fantazia fabelo aperis en presoj je la unua fojo post la morto de l' glora aŭtoro. Ni esperas, ke niaj legantoj estos kontentaj pri la lego de tiu ĉi fortimpresa verko, precipe nun, en la paska monato. — Samtempe ni altiras ilian atenton al alia paska verketo, la kortuŝa legendo pri Ahasvero, presita ankaŭ en nia jena numero (p. 51).

kiel ekkantis koko, kaj Vi eliris for kaj ekploris malĝoje. Same kiel mi. Vi ne povas ne enlasi min. »

Kaj silentiĝis la voĉo post la pordoj paradizaj. Kaj iom atendinte rekomencis la pekulo frapi la pordojn kaj peti, ke oni enlasu lin en la regnon ĉielan.

Kaj ekaŭdiĝis de post la pordoj alia voĉo kaj diris: « Kiu estas ĉi-tiu homo, kaj kiel li vivis en la mondo? »

Kaj respondis la voĉo de l' akuzanto kaj ĝi ree ripetis ĉiujn malbonajn agojn de la pekulo kaj nomis neniujn bonajn.

Kaj respondis la voĉo de post la pordo: « Iru for de tie ĉi, ĉar ne povas tiaj pekuloj loĝi kune kun ni en la paradizo. »

Kaj diris la pekulo: « Ho, Sinjoro! voĉon Vian mi aŭdas, sed la vizaĝon mi ne vidas kaj nomon Vian mi ne konas. »

Kaj diris al li la voĉo: « Mi estas la reĝo kaj profeto Davido. »

Kaj ne malesperiĝis la pekulo, ne foriris li de la pordoj de la paradizo, sed ekparolis: « Kompatu min, ho reĝo Davido, kaj rememoru la malfortecon de homoj kaj la kompatemecon de Dio. Dio amas Vin kaj glorigis Vin antaŭ la homoj. Vi havis ĉion: kaj la regnon, kaj gloron, kaj riĉaĵojn, kaj edzinojn kaj infanojn, sed ekvidis Vi de sur la tegmento edzinon de malriĉulo kaj la peko eniris en Vin kaj Vi prenis la edzinon de Urio kaj mortigis lin mem per la glavo de Amonitoj. Vi, riĉulo, forprenis de la malriĉulo la lastan ŝafineton kaj pereigis lin mem. Same agis ankaŭ mi. Kaj poste rememoru, kiel Vi pentis kaj parolis: « Mi konfesasm ian kulpon kaj ĉagreniĝas pro mia peko. » Same kiel mi. Vi ne povas ne enlasi min. »

Kaj silentiĝis la voĉo post la pordoj.

Kaj iom atendinte, la pekulo rekomencis frapi la pordojn kaj peti, ke oni enlasu lin en la regnon ĉielan. Kaj ekaŭdiĝis de post la pordoj tria voĉo kaj diris: « Kiu estas ĉi-tiu homo, kaj kiel li travivis en la mondo? »

Kaj respondis la voĉo de la akuzanto kaj trian fojon ĝi nomis la malbonajn agojn de la homo kaj neniujn bonajn.

Kaj respondis la voĉo de post la pordoj: « Iru for de tie ĉi, ĉar ne povas pekuloj eniri en la regnon ĉielan. »

Kaj respondis la pekulo: « Vian voĉon mi aŭdas, sed la vizaĝon mi ne vidas kaj nomon Vian mi ne konas. »

Kaj respondis la voĉo: « Mi estas Johano Teologiisto, la plej amata disĉiplo de Kristo. »

Kaj ekĝojis la pekulo kaj ekparolis: « Nun neeble estas ne enlasi min: Petro kaj Davido enlasos min pro tio, ke de ili konataj estas la homa malforteco kaj la kompatemeco de Dio. Kaj Vi enlasos min pro tio, ke en Vi estas multe da amo. Ĉu ne Vi, ho, Johano Teologiisto, skribis en Via libro, ke Dio estas la Amo, kaj ke ne-amanto ne konas Dion? Ĉu ne Vi en la maljunaĝo

diris al homoj sole la jenajn vortojn: « Ho, fratoj, amu unu la alian! Kial do nuntempe Vi ekmalamos kaj forpelos min? Aŭ rezignu tion, kion Vi mem diris, aŭ ekamu min kaj enlasu en la regnon ĉielan. »

Kaj malfermiĝis la pordoj paradizaj kaj ĉirkaŭprenis Johano la pentantan pekulon kaj enlasis lin en la regnon ĉielan.

Esperantigis N. ŜVECOV.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Annuaire de la Société Française pour la propagation de l'Esperanto (1911). 104 p. 11 × 17. — Secrétariat de la S. f. p. E., 33, rue Lacépède, Paris. Prezo: 1 fr. (0,40 Sm.).

Oni trovas en tiu ĉi de S-ro Em. Robert tre zorge redaktita verko la adresojn de la komitatanoj, konsuloj, profesoroj, k. t. p. de la grupoj, el kiuj konsistas la S. f. p. E.; ĝi estas plej certa kaj plena adresaro por Francujo, kaj montras la mirindajn progresojn de Societo, kiu antaŭ du jaroj kalkulis apenaŭ 40 grupojn kaj 1600 membrojn, kaj nun enhavas 6 federaciojn, 170 grupojn kaj preskaŭ 9000 membrojn.

Du Paroladoj, de EDM. PRIVAT, kun antaŭparolo de Prof. CART. 15 p. 12,5 × 19. — Prèsa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo: 0,25 fr. (0,10 Sm.).

Kun plezuro, ĉiuj esperantistoj relegos tiujn paroladojn aparte eldonitajn, eliritajn el « Lingvo Internacia ». Nenie oni montris pli konvinke kaj elokvente, ke *vivas* nia lingvo.

Dictionnaire usuel Esperanto-Français, par E. GROSJEAN-MAUPIN. Kolekto de « La Revuo ». 144 p. 10 × 16. — Hachette & C-ie, 79, boul. St-Germain, Paris. Bindita; prezo: 1 fr. (0,40 Sm.).

Nia kritiko pri la « Plena Vortaro » de la sama aŭtoro elvokis grandan bruon de la parto de S-roj Bourlet kaj Grosjean-Maupin en « La Revuo », en kies lasta numero S-ro Bourlet diras interalie: « ĉu eble S-ro Lengyel forgesis, ke Grosjean-Maupin verkis ne unu, sed du vortarojn? » — Ne, mi ne forgesis ĝin; sed la dua vortaro ne estis ankoraŭ aperinta, kiam ni kritikis la unuan.

Nu, mi ne kritikis mem la intertempe aperintan duan Vortaron, sed ĉerpas kritikon pri ĝi el alia gazeto. — Jen:

“ En tiu ĉi sia mezgranda vortaro Esperanto-franca la aŭtoro parte riparas tion, kion li malbonigis en sia Plena Vortaro per enkonduko de propraj, arbitraj ŝanĝoj kaj novaĵoj, kiuj elvokis la pravan proteston de l'esperantistaro. La plej granda parto de la arbitraĵoj estas forigita el tiu ĉi nova vortaro, sed bedaŭrinde la aŭtoro ankoraŭ ne tute liberigis el sia danĝera tendenco. Kelkajn vortojn, kvankam ili troviĝas en Fundamenta Vortaro, li forigis, « ĉar ili estas senpere kompreneblaj »; anstataŭ tio S-ro Gr.-M. enkondukis, je propra respondeco, novajn vortojn, kiel: torporo, fifro, kuspi, grefti, stampfi k. t. p., kiujn ne konas la ĉiulandaj esperantistoj. ”

(El « Pola Esperantisto », Varsovio.)

Petit Cours primaire d'Esperanto, de D. BONNEHON et A. ROSSIAUX. 128 paĝa, 12 × 18. — Paris, Hachette, 79, Boulevard Saint-Germain. Bindita; prezo: 1 fr. 20 (0,48 Sm.).

Tre bona lernolibro por ellerni Esperanton; ĝi estas precipe taŭga por junuloj, kiuj kvazaŭ sin amuzante povas alproprigi per ĝi nian

lingvón. La metodo sekvata en ĝi estas simpla kaj facila; la bravaj aŭtoroj, kiuj estas instruistoj,² faris vere utilan laboron.. La libro estas bele presita.

Mistera krimo, unuakta komedieto, kiun aranĝis al Esperanto MIKAELO CASES. 40 p. 12 × 19. — Prezo : 1 fr. (0,40 Sm.).

Amuza komedieto, kiu meritas la tralegon; bedaŭrinde estas nur, ke multaj lingvaj eraroj troviĝas en ĝi, precipe je la uzado de l'akuzativo kaj de la adverba formo de l'participo. La verko estas acetebla per antaŭsendo de enlandaj aŭ eksterlandaj poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj ĉe S-ro Mikaelo Cases, strato Salmeron, 229, 4^o 2^a, Barcelona.

Amoro kaj Psiĥe, de LUCIUS APULEJUS, el la latina originalo tradukis EMILO PFEIFER. Esperanta Biblioteko Internacia N^o 14—15. 64 p. 19 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstrasse 18—19. Prezo : 0,20 Sm.

Kiel ĉiuj eldonaĵoj de la fame konata esperantista firmo, ankaŭ tiu ĉi klasika verko estas interesa kaj leginda.

PAUL DE LENGYEL.

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 \$, — 2) samon en valoro de 1 \$, — laŭ elekto de la premiotoj.

Verki frazon, en kiu nur unuspeca vokalo estas uzata. — Oni rajtas elizii la substantivan terminon o kaj la artikolan a laŭbezone.

PRI NIA ANTAŬLASTA KONKURSO. — Jen la nomaro de l'konkursintoj, aŭtoroj de la 39 frazoj presitaj en nia januara numero (p. 15): F-ino L. Hall 1—2, Marcel Prisier 3, L. Müller 4, Ivan Probojĉević 5—6, F-ino Odette Meyer 7—13, Hans Sengerob 14, G. Bauer 15, Josefo S. y Coll 16, J. Lubert 17, D-ro A. Vječorkjeviĉ 18, Leon Horović 19—22, A. Quesnet 23—24, F-ino V. Proksch 25—27, S-ino M. Meylan-Mairet 28—36, Emile Antoine 37, A. Teodoroviĉ 38, R. Hedborg 39.

La ĝenerala rezultato de l'juĝo de niaj legantoj, laŭ iliaj voĉdonoj, klasigitaj de ni, estas la sekvanta: 23 15 7 28 4 10 8 29 11 37 24 9 33 20 26 16 38 36 12 1 35 13 14 30 22 34 39 17 32 31 18 3 25 21 2 19 27 5 6. — Gajnis do la unuan treon S-ro A. Quesnet; la duan: S-ro G. Bauer; la trian: F-ino Odette Meyer; la kvaran: S-ino M. Meylan-Mairet; la kvinan: S-ro L. Müller; la sesan: S-ro Emile Antoine; la sepan: S-ro Leon Horović. — Laŭ la voĉdonoj, S-ro Quesnet gajnis 2 premiojn, F-ino Meyer 5 premiojn kaj S-ino Meylan-Mairet 3 premiojn; sed laŭ niaj kondiĉoj publikigitaj sur la paĝo 16-a, ili havas la rajton nur po unu premio.

En la juĝado partoprenis 137 personoj. La nomaron de l'juĝintoj, kiel ni jam diris, ni presos en nia venonta numero.

Korespondado de la Redakcio.

Ni petas tiujn personojn, kiuj deziras ricevi de ni leteran respondon, ke ili bonvolu sendi al ni internacian respondan poŝtkarton aŭ internacian poŝtan respondkuponon.

Pro manko de spaco, en nia hodiaŭa numero ni ne povas presi la kurtimajn ĉiunumerajn rubrikojn « Pedagogia Fako » kaj « Humorajoj ».

Niajn kunlaborantojn ni atentigas, ke ni, dum la lastaj monatoj, ricevis multe da longaj presindaĵoj. Ni do petas ilin, ke ili prefere sendu al ni mallongajn artikolojn (unu- aŭ du-paĝajn), laŭeble literaturajn, ĉar per longaj rakontoj ni estas troe provizitaj por longa

tempo; aliparte, ni jam spertis, ke mallongaj legaĵoj estas pli ŝatataj de la legantoj, ol la longaj rakontoj. — Ankaŭ per poezioj ni estas sufiĉege provizitaj.

C. J. G. — Pri la sencoj de la demanditaj vortoj vi trovas precizan klarigon en la « Vortaro de Esperanto » de Kabe; pri la elizio — sur la 159-a paĝo de « Juna Esperantisto » 1910.

A. Z. (Dresden.) — Ni devis ĝin prokrasti por la venonta numero.

Persona deklaro.

S-ro Carlo Bourlet, redaktoro de « La Revuo », sentis sin ofendita pro mia novjara fantazia artikolo « Mia ekjaro », kaj nekontenta pro la kritiko pri la « Plena Vortaro » de S-ro Grosjean-Maupin, ambaŭ presitaj en la januara numero de « Juna Esperantisto ». Pro tio, li publikigis en « La Revuo » leteron kontraŭ mi, pure *personan*, kun demandoj adresitaj al mi. Dezirante presigi mian respondon en « La Revuo » mem, mi ĝin sendis al S-ro Bourlet; ĝin ricevinte li skribis al mi la 15-an de Marto la sekvantan leteron:

« Mi ricevis vian leteron de 12-a de Marto kaj la enpresotan artikolon aldonitan. Se vi tion nepre volas, mi ĝin enpresos; sed mi kompreneble estos devigita aldoni al via letero multajn rimarkojn kaj plie precizigi multajn detalojn pri la Presa Esperantista Societo, pri la Prezidanto de ĝia Administrantaro, pri ĝiaj financaj kalkuloj, pri via persona salajro, k. t. p. Mi ankaŭ estos devigita rimarkigi kelkajn neĝustajojn, kiuj troviĝas en tiu letero.

Kaj nun mi demandas vin: Ĉu vi deziras, S-ro Lengyel, ke mi daŭrigu konigi al la publiko ĉion tion. Ĉu vi ŝuŝoras, ke la publiko vin aprobas tial, ke vi daŭrigis viajn atakojn kontraŭ mi?

Volu, mi petas, tuj respondi ĉar la tuta proksima numero de « La Revuo » estas jam kompostita, kaj sekve por kontentigi vin (ne miajn legantojn) mi devus ŝanĝi tuj la jam kompostitan numeron. Akceptu, Sinjoro, miajn salutojn.

C. Bourlet. »

Kompreneble, post *tia* letero, — kiu estas tio, kion france oni nomas *chantage*, — nenion alian mi povis fari, ol postuli la enpreson de mia, de S-ro Bourlet mem *antaŭe* petita respondo — ne « atako ». Sed S-ro Bourlet tamen ne plenumis sian promeson: li publikigis nur parton de mia letero. Li eldraŝis la grenojn el la spiko kaj regalas la legantaron per la pajlo. Ĉu estas lojale tiel agi?

Mi do estas devigata respondi lian *ripetitan* demandon tie ĉi, citante nur unu frazon el la de li rifuzita parto de mia letero: « Vi mian demandas, kial mi iradis al vi kaj ne al S-ro Cart? Nu, tial, ĉar *tiam* mi konis nek vin, nek lin. Nun mi konas vin ambaŭ... ». Vere, lin kaj S-røn Cart, mian honoratan kaj honorindan prezidanton, antaŭ 5—6 jaroj mi apenaŭ konis.

S-ro Bourlet diras, ke li skribis al mi kiel privatulo al privatulo kaj ke mi respondas al li kiel Akademiano. — Li eraras en sia supozo. Ankaŭ mi skribis kiel privatulo kaj ne *kiel* Akademiano (nek kiel redaktoro). Nur tial mi uzis du el miaj esp. titoloj *post* mia subskribo, ĉar mi volis montri, ke: 1) estante ĉefredaktoro de esp. gazeto, mi havas la rajton, — 2) kaj estante esp. Akademiano, mi havas la kompetentecon kritiki la Grosjean-Maupin'an Vortaron.

S-ro Carlo Bourlet diras ankaŭ, ke mi, Akademiano, « nenion faris », kaj « jen la unua fojo », kiam mi rememoras mian oficon. — Li eraras ankaŭ en tiu ĉi aserto, aŭ eble oni lin erarigis. Mi povas lin certigi, ke dum mia duonjara akademianeco mi ĉiam plene faris kaj faras mian devon. — Restas nun la demando: *de kiu kaj de kie* S-ro Bourlet, la privatulo, ne-Akademiano, akiras informojn pri la agadoj de Akademiano?...

PAUL DE LENGYEL

ĉefredaktoro de « Juna Esperantisto ».